

Mensuel  
Numéro 58  
Octobre 2009

# La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

Espéranto :  
vers une culture sociale sans frontières.

Zone euro : 3,50 €  
Suisse : 5 FS  
Autres pays : 4,50 €

## Homara Festo:

Fêt<sup>de</sup>l'Humanité  
11.12.13 SEPT 09



600 000  
vizitantoj

...

*kaj ni,  
kaj ni,  
kaj ni !*



# Flore kuku !

## Pir ĉokolada torto



Preparado: 30 min  
Kuirado: 25 min

Por 8 personoj:

1 murbo  
100 g da ĉokolado en pecetoj  
2 ovoj  
3 piroj  
20 cl da likva kremo  
70 g da nuksa pulvoro  
50 g da sukero

por la murbo:

300 g da faruno  
150 g da mola butero  
iomete da salo  
8 cl da akvo

Miksi unue farunon kaj salon. Aldonu la buteron kaj miksu delikate per la fingroj dum kelkaj minutoj.

Laste aldonu la akvon, kaj ĉion miksu kune.

Ĝi nun povas esti metita en la torto plado.

Se vi ne deziras fari ĉion ĉi, vi povas aĉeti jam faritan murbon, ankaŭ tre bongustan.

Ŝaltu la fornon je 220 °C. En salatujo, miksu kune la kremon, nuksan pulvoron, sukeron, ovojn, pirojn en pecetoj kaj ĉokoladon. Verŝu la preparajon sur la murbon.

Lasu en la forno dum proksimume 25 minutoj.

Flora Markov

## Homara Festo:

Organizita sub la respondeco de FET, sed kun homa kaj financa subteno de SAT-Amikaro, UFE kaj JEFO, la prizorgado de la Esperanto-budo dum la Homara Festo, kiu ĉiujare okazas dum la dua semajnfino de septembro, estas unu el la plej gravaj varbokazoj en Francio por diskonigi la ekziston de Esperanto kaj ĝian utilecon por laboristoj.

Ĉi-jare la publiko estis aparte abunda. Laŭdire proksimume 600 000 homoj entute. La homa svarmo estis aparte impresa vendrede kaj sabate. Evidente, ne ĉiuj venis kun plej klerigaj intencoj. Iuj eĉ tute senkaŝe venis nur por diboĉi kaj ĝui malmultekostajn koncertojn kun famaj artistoj. Kaj la aĝa dispartigo inter la telerpurigantoj en iuj budoj kaj la



# plej grava poresperanta varbejo

festantoj en la pasejoj sufiĉe elokvente indikis, ĝis kia grado la konsumisma kaj individuisma pensmaniero invadis eĉ la «progreseman» medion.

Tamen, se flankenmeti la suprajemajn festemulojn, restis tamen sufiĉe multaj seriozaj homoj por okupi la deĵorantojn ĝis post la unua matene vendrede kaj sabate. Eĉ en tiuj malfruaj horoj okazis tre seriozaj diskutoj, kaj vendiĝis lernmaterialo. Ja grava perceptebla ŝanĝo, kompare kun antaŭaj jaroj, estas ke pli kaj pli multaj vizitantoj venas al la budo ne kun la demando «Esperanto? Kio estas tio?», sed petas «kiel mi povas lerni?» aŭ «kiel oni diras tion aŭ tion en Esperanto?». Vendiĝis la 30 kunportitaj poŝvortaroj kaj sesdeko da «unua lernolibro». Dekkvino da scivoluloj ĉeestis unuan malkovro-sesion, kaj la sabata sesio eĉ duobliĝis, pro malfrua alveno de dua aro da scivoluloj. Al ili aldoniĝis la centoj da nekonatoj, kiuj vidis la vorton «Esperanto» ĉe la kruciĝo inter tri malsamaj vojoj, sur la 50 aŭŝoj pri kursoj vinktitaj al diversaj elektrofostoj aŭ sur la poŝkalendaro, kiun ili ricevis preterpasante la budon.

Grava estas la diverseco de deĵorantoj malantaŭ la budo. La ĉeesto de homoj, el kiuj kelkaj havas tute

malsamajn motivojn por interesiĝi pri Esperanto ebligas tuj konstatiĝi al la informpetantoj, ke la Esperantomovado konsistas el plej diversaj homoj, kaj ne el samideaj sektanoj..

Plej fratecaj rilatoj ankaŭ plektiĝas, kun paso de la jaroj, kun najbaraj deĵorantoj. Aparte varma estis la rekuniĝo kun amikoj el la eldonejo «La Tempo Ĉeriza», kiuj plurfoje helpis nin por solvi praktikajn problemojn dum la lastaj jaroj. Sed ankaŭ kamaradoj el pluraj aliaj budoj venis por saluti konatojn. Ankaŭ vizitis nin diversaj esperantistoj aŭ ties parencoj kaj konatoj, kiuj vagis tra la festo.

El praktika vidpunkto, estis dudeko da helpantoj por deĵori, munti kaj reloki la materialon. La nombro de tranoktatoj en la budo estis iom pli alta ol pasintjare, kio ebligis malfermi la budon pli longe, kaj en malpli streĉaj kondiĉoj.

Se ni sukcesos esti eĉ pli multnombraj venontjare, certe eblos labori ankoraŭ pli komforte, kaj uzi parton de la tiel ŝparita energio por pliprofundigi la kontaktojn kun aliaj fratorganizoj, kiuj ĉeestas en la festo.

Vinko Markovo

## Ilia tute unua leciono

Tradicie, en ĉi Homara Festo, Vinko gvidas kurson por homoj kiuj rekrutiĝas nur per la multaj aŭŝoj pinglitaj sur la diversaj fostoj. Alvenas do tute nekonataj homoj, kiuj konas eĉ ne unu vorton en Esperanto, foje eĉ neniam antaŭe aŭdis pri tiu lingvo. Kaj jen la veto de Vinko<sup>(1)</sup>: en nur unu horo, sufiĉe profunde konigi la funkciadon de la lingvo.

Tiucele, Vinko uzas paperan apogilon, kiun li trovas en tre bona eldonaĵo: ja La Sago (*kvankam ne speciale didaktikan, ĉu ne?*) kaj pli precize en ĝia entenata bildstrio (*ankaŭ tre valora parto - ĉu ne?- sed ankaŭ tute ne verkita kun pedagogiaj aŭ didaktikaj celoj...*)

Kaj jen, sen ajna preparado, Vinko anoncas ke oni tuj legos kaj tradukos tiun bildstrion.

Komencas legi unu lernanto. Tuja halto: «Atentu! Ĉiuj vortoj havas akcenton sur la antaŭlasta silabo! Daŭrigu.» (*en la franca, evidente*). Post malmulte da tempo nova halto «La litero 'c' prononciĝas 'ts', ĉiam, sen escepto». Kelkaj eligas paperon por noti... ĉe la fino de la legado, la rezulto jam estas sufiĉe bona...

Nun traduko. Vinko proponas ke oni divenu kiel eble plej, pere de la desegno, kaj ankaŭ pere de la simileco de la vortoj, ĉu vide, ĉu aŭde (*evidente tio malplibone funkcias se ni estus ĉinoj...*) kaj jen, la klarigoj alvenas laŭ la disvolvo de la teksto, kaj tute ne laŭ zorga pripensado por didaktika progresado, vagante de simplaĵoj kiel «as» por signi la tenson de la nuno al sufiĉe torditaj kunmetaĵoj (*ĉu vere estas torditaĵoj en ĉi bildstrio?*) kaj eĉ vort-ludoj.

Kaj jen, post unu horo kaj duonpaĝa bildrakonto, post ilia tute unua leciono, ili evidente kvazaŭ nenion povos reuzi, sed ĉiuj havas tre bonan ideon pri la ecoj de Esperanto. Ja Vinka venko!<sup>(2)</sup>

Ĉu tia metodo povas esti uzata kun la celo vere lernigi la lingvon? Mi kredas ke jes. Tio analogas al la situacio de iu, kiu post memvola migrado en fremdan landon, devas lerni la tiean lingvon, kaj tion faras ne laŭ la gramatiko, sed laŭ la hazardo de la neceso aŭ de la okazaĵoj, kaj ĝenerale rapide kaj sukcese...

Serĝo Sir'

(1) Se estus la frato, la esprimo «veto de Vito» estus pli amuza...

(2) Tie male «Vita venko» estus malpli amuza...

## Enhavo

- 1 Kovrilpaĝo
  - & Homara Festo:
  - 3 Plej grava poresperanta varbejo
  - 2 Flore kuiru.  
BildDeliraĵo: La kastel-nova grupo, 9
  - 4 La bagno de Nosy-Lava
  - 5 Unuafoja kongresano
  - 4-5 Leginda legendo:  
La ĉevalo kun ok kruroj
  - 6 Libro vivas pli ol unu sezono: Verda Trobadoro  
Selle Humuraĵo
- Supplément en français**
- 7 Une rencontre anationale de travailleurs et progressistes.
  - 9 Ça bouge partout
  - 10
  - 11 Utilaj informoj  
- Kiel traduki: Tête
  - 12 Libro-Servo
  - 13 Kontribuo al Vikipedio: Otava tramposindikato.
  - 14 Esperantistoj aktivas.  
Selle Humuraĵoj
  - 15 SATamikara Kongreso 2010
  - 16 Bonvenon en Hiliono



### Partoprenis en ĉi numero: (laŭ alfabeto ordo)

Andreo	Andrio
Nura	Co
Roland	Cuenot
Andrea	Fontana
Louis	Gohin
Fil	Guichet
Maksimiliano	Gverino
Ĵak	Le Puil
Franjo	Leveque
Flora	Markov
Vinko	Markovo
Vito	Markovo
Guy	Martin
Line	Maurel
Jean	Selle
Serĝo	Sir'
Juliette	Ternant

# Koloniismo kaj postkoloniismo – Madagaskaro. La bagno de Nosy-Lava.

Nosy-Lava estas insulo, kiu troviĝas en nordokcidento de Madagaskaro, insulo pri kiu neniu parolis ĝis la 9a de majo 2003, ĉar la denuncio koncernanta ĝin povis altiri la atenton de la turistoj avidaj pro ekzotismo.

Nu, Nosy-Lava, ekde 1911 ĝis 2000 estis bagno. Dank' al malagasa ĵurnalisto Rivoherizo Andriatoko, kiu dokumente enketis, havante la premion Albert Londres, oni de nun scias ke tiu «tropika Gulago» estis instalita dum la periodo de franca koloniismo.

Elsendita ĉe la malagasa televido, tiu dokumenta filmo havis tiajn ehojn ke, tiuepoke, la prezidanto Didier Ratsiraka estis devigata pardoni entute la laborpunitojn ankoraŭ tenitajn, en insulo, kie oni trovas ombroplenajn strandojn de kokospalmoj kaj sur la marbordo pirogojn.

Televida ĵurnalisto de sabato 3a ĝis vendredo 9a de Majo sciigis ke la dokumento estis programita ĉe «Francio 2».

Francio en sia indulgo, laŭdire, asertis firme kunporti al la popoloj, kiuj estis subevoluintaj, la principojn de 1789-1793, t.e. Libereco, Egaleco, Frateco, kaj neniam forgesis malfermi bagnojn, malliberejojn, kultolokojn.

Madagaskaro, dekomence, estis vetajo inter Francio kaj Britio, pro alveno unue de la protestantaj kaj katolikaj misiistoj, poste de la komercistoj, aventuremuloj, kiuj fine neniigis ĉiujn socialajn strukturojn, ebligante la oficialan koloniadon.

Unuatempe, Madagaskaro estis aneksita la 6an de Aŭgusto 1896,

fariĝante entute franca kolonio.

Denove leginte la bonegan libron verkitan far la Malagasa historiistino Janine Harovelo, «La Franca Sekcio de la laborista internacio (en franca lingvo S. F. I.O) kaj Madagaskaro», 1947, oni ekaŭdas ke dum la kolonieto, la rezisto estis senfina, alportanta malkonfirmon por legendo zorge daŭrigita de la kolonia medio laŭ kiu la koloniaj francaj armeoj estus akceptitaj kiel liberigantoj por aliaj gentoj subpremitaj de la «Hovanoj» (aŭ Merinanoj, loĝantaj la altebenaĵojn kies Antananarivo estas la ĉefurbo).

La fia generalo Gallieni kiu estis la unua franca prokonsulo, de 1896 ĝis 1905, sin okupis pri (kiel en Tonkinio, norde de Vjetnamio) veraj amasbuĉadoj en la kampara loĝantaro, fare de la mortokolonoj.

Li jam estis fakulo pri tiu aspekto de la krimoj, por «pacigo» (esprimo retrovota, post pluraj jardekoj, dum la Hinduĉinia kaj Alĝeria militoj, sen forgesi, certe ja, Madagaskaron, de 1947 ĝis 1950).

J. Harovelo citas la movojn de la baraktadoj «Menalambo» (ruĝa ŝtofo), de 1896...unu jaron post la aneksado... kaj «Sadiavahy»...1915.

La ribelejo de 1947, dronita en la sango, de franca armeo, estis naskita de la milito de liberigo kontraŭ la nazioj, heredis kaj de la aroganteco kaj de la komplekso de supereco de la malnovaj koloniaj trupoj.

Konsekvenve, la koloniado instalistion, kion la malagasa ĵurnalisto nomas «tropika gulago», kiel en

Vjetnamio (Poulo Kondor), insuloj kie la deportitoj mortis, pro senforteco, malsato, kaj laboroj kiuj nenian celon havis, pro perfortaĵoj de la provosoj ŝanĝitaj en torturistoj.

Sinsekve, dum tiu nigra periodo, Nosy Lava estis la bagno, koncerne multajn rezistantojn kontraŭ la koloniismo, sen forgesi la mortokondamnitajn kiuj estos pardonitaj dank' al la internacia premo.

Travivos, ĉi tie, la kondamnitaj, porĉiame, de la procesa maskerado kontraŭ la parlamentanoj de «demokratia movo de la malagasa renovigo» (MDRM) la 4an de oktobro 1948.

La bagno nur fine estis fermita nur en 2000 sekve de tiu enketo. Tiel, oni povas meti demandon. «Ĉu tio okazus, se Rivoherizo Andriakoto ne tion kondukus ĝis ĝia fino?»

La ĵurnalisto precizigas ke «iuj malliberuloj, dum la koloniaj francaj ordonpovoj, surloke ankoraŭ stagnoputras (kaj tio malgraŭ la sendependeco de 1960). Ĉiuvespere, la provosoj daŭrigis fermi la pordojn de la ĉeloj. Ili estis forgesitaj. Ĉiumatene, servutoj, kaj precipe, purigado de la estrodomo.

Koncerne la ribelantojn, ili estis senigitaj je nutraĵo.

Junaj ili estis je la alveno, nun iliaj hararoj blankiĝis, la haŭto velkis, kaj pluraj el ili plenumis ĝis 10 fojojn la komencintan punon, sen iam ajn esti juĝitaj...

Louis Gohin

## Leginda Legendo

invitas vin legi legendojn el kvar kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj pri eroj el la prezentitaj tekstoj. Kvankam ĉefe destinata al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

La dioj timis la gigantojn<sup>1</sup>. Efektive, antaŭdiro<sup>2</sup> anoncis ke la gigantoj trairos la ĉielarkon nomita Bifrost kaj eniros Asgardon, la dian teron<sup>3</sup>. Poste, okazos batalo kaj estos la tempofino. Do, la dioj desegnis citadelplanon por protekti sian teron. Sed, ili ne sciis konstrui la citadelon. Iam, la edzino de Odin kiu

## La ĉevalo kun ok kruroj. legendo el la vikinga mitologio.

nomiĝas Frigg, serĉis la plej bonan masoniston<sup>4</sup>. Ŝi trovis lin, kaj la dioj demandis ĉu li akceptas. «Jes, respondis la masonisto, sed mi volas tri sezonojn. Se mi finos la citadelon, rekomencu min. Donu al mi la lunon, la sunon kaj Freya-n, la diinon de la beleco». La dioj malakceptis... escepte de Loki, la dio de malbono kaj ruzo. Li diris: «Donu al la masonisto nur unu sezonon. Tiel li ne povos fini la citadelon, sed li masonos unu grandan parton». La masonisto

akceptis labori por la dioj. Li devos labori sola, nur kun sia ĉevalo kiu nomiĝas Svadilfari.

La unuan tagon, la masonisto laboris multe. Li transportis multepezajn ŝtonojn pere de sia ĉevalo kaj Svadilfari portis la granitajn ŝtonojn tiel facile kiel plumojn. La duan tagon, la masonisto jungis<sup>5</sup> Svadilfari-n je la plugilo<sup>6</sup> kaj kavigis<sup>7</sup> la fundamentojn. La tagoj pasis. La ĉirkaŭmuroj estis konstruitaj. La sep

# Unuafoja kongresano.

Pasis pli malpli unu monato ekde la fino de la 82a SAT-kongreso, okazinta en Milano.

Por mi la sperto partopreni ĝin estis tute aparta, ĉar mi samtempe estis kaj kunorganizanto (kvankam en ne formala maniero) kaj unuafoja kongresano; kaj plie temis pri mia unua rekta sperto de la SAT medio, tial ke mi estas relative freŝbakita SAT-ano, kaj tial ke ĝis nun ĉio, kion mi konis pri SAT, estis simple tio, kion mi legis en Sennaciulo kaj en Sennacieca Revuo.

La SAT-kongreso surprizis min pro du ĉefaj kialoj.

Unue, antaŭkongrese mi iom timis ke ni spertos organizajn malfacilaĵojn kaj neantaŭviditajn problemojn, kiel kutime okazas kiam oni organizas kongresojn aŭ renkontiĝojn de multaj homoj; tamen ĉio iris rimarkinde glate, kaj mi havis la tre plaĉan impreson ke la kongreso mem estis vivigata de ia kapablo sinorganizi, danke al la laboremo kaj kunlaboremo de la unuopuloj, kiuj surpris sur siaj ŝultroj la kunsidlaborajn taskojn, kaj danke al la aktiva partoprenado en la diskutadoj fare de preskaŭ ĉiuj kongresanoj.

Due, antaŭkongrese, kaj pli frue antaŭ mia aliĝo al SAT, la legado de la SATa Statuto donis al mi la malpravan impreson, ke la decidorganoj, la strukturiĝo, la funkciado de la Asocio estas io esence burokrata kaj peza, kaj ke la celata desuba demokratio estas neatingebla pere de tiu (maltrafe supozata) burokrateco; kia surprizo, do, kiam mi rekte spertis

kiel bone funkcias la diskutadoj kaj la decidoprocezoj dumkongresaj! Kiel plaĉe estis konstati kiel homoj, kiuj ja havas opiniojn kontraŭajn inter si, vere sukcesas kundialogi, atente prikonsiderante unue la pensojn de sia kontraŭulo, fine atingante kundecidojn!

Tre plaĉe estis por mi konstati, plie, kiel la kleriga kaj maldogmiga celo de SAT estas vere bone plenumbla pere de la rekta kunbabilado kaj kundiskutado dum la Kongreso. Fakte oni ne nur multe diskutis, en demokrata kaj kunlaborema etoso, pri la organizaj kaj/aŭ internaj aferoj de la Asocio (atingante la finan komunan verkon de la Gvidrezolucio kaj de la Deklaracio), sed ja vere, laŭstatute, oni sukcesis informi unu la alian, klerigi/kunkleriĝi, per komparado de malsamaj opinioj kaj ideoj, en etoso de respekto kaj scivolemo.

Do, mi feliĉe malkovris ke la desuba, "horizontala" (kiel oni diras en la itala), partopreniga demokratio de SAT ne estas io nur revata en la vortoj de la Statuto, sed estas io, kio vere funkcias en la realo.

Por mi la kongreso vere estis tre laciga: tial ke mi ĉiutage irrevenis de kaj al ne tro proksima urbeto, mi neniam sukcesis dormi pli ol po 5 horojn nokte, dum la tuta semajno. Plie, tial ke mi intencis pretigi riĉan dokumentaron pri la tuta kongreso (per granda fotaro kaj per sonregistrado de plejeble multaj kunvenoj kaj prelegoj), mi sekvis atente ĉiun debaton kaj ĉiun debatan frazon – krom du debatoj, kiujn mi ne sukcesis partopreni. Tio ja

estis laciga, kaj mi nur povas imagi kiom pli laciga estis la vere peza laboro de la sindonemaj protokolistoj kaj proponkomisionoj, kiuj faris bonegan laboron por ni ĉiuj.

Nu, mi do spertis tion, ke SAT-kongresano, kiu vere serioze volas kongresumi (kaj la granda plejparto ja faris tion), ne "ferias" kiel en aliaj kongresoj, sed ŝi aŭ li ja intense laboras, kaj kore kaj mense, kvankam ja temas pri laborado plaĉa.

Post unu monato ekde la fino de la Kongreso, mi ankoraŭ povas senti la nostalgion pri tiel riĉaj tagoj, kaj ankoraŭ staras antaŭ miaj okuloj la bildo de la homo, kiu simbolas al mi la tipan partopreneman SAT-anon: Gary, kun sia nemalhavebla kajero en kiu li notas ĉiun gravan ideon aŭ punkton kiu naskiĝas el la kundiskutadoj, kiu havas mirigan kapablon aŭskulti la opiniojn de la aliuloj, kiu ĉiam sukcesas ĝisfunde pripensi kaj pripensigi, diskutante afable kaj racie.

Dankon do al ĉiuj SAT-anoj! Dankon al SAT!

**Andrea Fontana (Anĉjo Pachorano).**



pordoj estis traboritaj<sup>8</sup>, la sep turoj estis altigitaj. Svadilfari kaj ĝia mastro kreis fosaĵojn<sup>9</sup> ĉirkaŭ la citadelo. Ili plenigis ilin per akvo. La masonisto laboris tro rapide. Li finfine povus fini la citadelon. Pro tio, la dioj malesperis. Ili devus doni Freya-n, kaj ĉio okazus pro Loki. Do, Loki devis fiaskigi<sup>10</sup> la masoniston.

Loki observis la masoniston, kiu laboris.

Fakte, li laboris bone sed lia ĉevalo estas pli forta ol li. Tiu ĉevalo estas belega. Ĝi havas fortégajn kruojn<sup>11</sup>. Ĝia korpo estas fortmuskola. Ĝia kolhararo<sup>12</sup> brilas pro la suno. Svadilfari estas magia ĉevalo, li estas la sekreto de la masonisto.

Tamen Svadilfari estas ankaŭ virĉevalo, kaj kiel ĉiuj virĉevaloj, li amas ĉevalinojn. Do, Loki aliformiĝis<sup>13</sup> je ĉevalino<sup>14</sup>. Li

delogis Svadilfari-n kaj la masonisto ne povis fini la citadelon sen ĝi. Sed, la plej mirinda el tiu legendo, mi diros al vi: post monatoj, Loki naskis ĉevalidon<sup>15</sup>. La ido havis ok kruojn! Loki estis hontema, kaj donis la okkruran ĉevalon al Odin.

**Nura Co**

1	gigant-o	<b>géant</b>
2	antaŭ-dir-o	<b>prédiction</b>
3	di-a ter-o	<b>la terre divine</b>
4	mason-ist-o	<b>maçon</b>
5	jung-is	<b>attela</b>

6	plug-il-o	<b>charrue</b>
7	kav-ig-is	<b>creusa</b>
8	tra-bor-it-aj	<b>percées</b>
9	(ĉirkaŭ)-fos-aj-oj	<b>douves</b>
10	fias-ig-i	<b>faire échouer</b>

11	krur-o	<b>jambe</b>
12	kol-har-ar-o	<b>crinière</b>
13	ali-form-iĝ-is	<b>se transforma</b>
14	ĉeval-in-o	<b>jument</b>
15	ĉeval-id-o	<b>poulain</b>

## Libro vivas pli longe ol unu sezono...

*Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.*

## Verda Trobadoro

**Verda Trobadoro**, internacia kantararo de W. van den Blink kaj B. de Wit, FLE/SAT-Junulfako, 1986, 10 €. Jen ekstrakto de la antaŭparolo: «Okaze de la 75-jara jubileo de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo FLE, ni decidis eldoni novan kantararon. Jam de kelka tempo sentiĝis la bezono je pli moderna kantokolekto. Ekzistas diversaj kantararoj, sed tiuj havas la malavantaĝon ke mankas muziknotoj aŭ ke ili aspektas sufiĉe provizoraj. Ĉi tiu kantararo havas muziknotojn kaj ni esperas ke la aspekto estas sufiĉe alloga. La elekto de la kantoj estas subjektiva afero, ĉar diversaj geamikoj proponis kantojn, kiujn ili ŝatas. Kaj certe ne ĉiuj kantoj estas modernaj... sed jes tre agrablaj laŭ siaj melodio kaj teksto.»

Ja tiu ĉi kantararo estas nemalhavebla por ĉiu ŝatanto de kanzonoj. Ne nur pro la muziknotoj, sed ankaŭ ĉar unuafoje oni povis trovi kaj plej modernajn kanzonojn, el Usono, Britio, Francio, Germanio, Italio, ktp, kaj originalajn kanzonojn, kiel la mirindan Verda Ĉapo de Vittorio Dalaqua kaj Gianfranco Molle.

La kanzonoj estas klasifikitaj jene: Kanzonoj kaj ŝlagroj – kun i.a. Ekkiam regos am’ sur ter’ de Raymond Levesque en traduko de Georgo Lagrange kaj ne de Le Puil! Lili Marlene - Esperanto-kantoj –

La kongresurboj, Verda Ĉapo - Naturamikaj, Popolkantoj – Adiaŭa kanto, Gŭantanamera, Trinkokantoj, Ironiaj kantoj – Fromaĝ’ el Edamo de Ŝvarco! -, Feminismaj kantoj – Kaj kvankam ni virinas, La viroj -, Socikritikaj kantoj-kunlaemociplena Balado pri Pinelli, Ja ni venkos!, La internacio, ktp– kaj Packantoj – kun Ho belulin’, La dizertonto, Venkos ni en glori’ (famkonata kanto el la batalo de usonaj nigruloj por egalaj civitanaj rajtoj). Entute 92 kanzonoj! Kaj nun trobadoriĝu vi!...

**Jak Le Puil**



### Verda Ĉapo

1  
Estis foje Ĉapo Verda, la, la  
Bona knabo, multe lerta, la, la  
Diligenta novlernanto  
De la lingvo Esperanto, la, la

2  
Dum li iras al la grupo,  
Renkontiĝas kun la lupro,  
Deĵoranto, sub servuto  
De la brita instituto

3  
Por la svingo kaj la lek’  
De la flago «Junjon-ĝek»  
Kun oksforda tono diras  
La lupeg’: «Vi kien iras?»

4  
«Al la kurs’ konversacia,  
De la lingv’ internacia,  
Kaj neŭtrala kaj facila  
Por la tuta mond’ utila!

5  
Tuj respondas ĉapuleto  
Kun en man’ verda libreto  
Kaj ĝentile salutante,  
Al la klub’ ekiras lante,

6  
Sed la lupro pli rapide,  
Ĝin atingas, kaj perfide,  
Ruze trompas l’ instruiston,  
Kiu perdas la ekziston,

7  
Formanĝita unuglute  
De la lupro, kiu tute  
Tuj kamuflas sin simile,  
Kaj atendas tre trankvile,

8  
Tok! Tok! Venas Ĉapo frape,  
Kaj li haltas, mire, gape,  
«Kiel grandaj la okuloj!»  
«Por kontrolo de l’ reguloj!»  
9  
- Diras lupro sen ŝanceloj,  
«Kiel grandaj la oreloj!»  
- Verda Ĉap’ insisti provas.  
«Tiel aŭdi bone povas  
10  
Mi pri kaz’ akuzativa».  
Verda Ĉapo plu naiva  
«Kial estas buŝ’ enorma,  
Kiel granda pordo forna?»  
11  
«Por vin manĝi ja pli bone!»,  
Kaj la lupro, senpardone,  
Salte kaptas Verd’an Ĉapon  
Manĝas korpon, manĝas kapon.  
12  
Lin englutas dumminute,  
Lin kruele voras tute,  
Ŝiras, maĉas ĝin kun krako,  
Ĝis pleniĝo de l’ stomako,  
13  
Kaj post tiu entrepreno  
La lupeg’ sen ia ĝeno  
Vivis longe dum jarcento,  
Tre feliĉe kaj kontente.

teksto: Vittorio Dalaqua  
muziko: Gianfranco Molle  
laŭ itala popola melodio

### Selle Humuraĵo



### Bone kadri la kadrulojn

Ha, ha, ha! Tiu nova  
selektada sistemo  
ebligas trovi la kadrulojn  
kiuj plej efike kaptos  
la monon de la klientoj.

Ha, ha, ha!  
Sinjoro  
la direktoro,  
la gajno estas  
en niaj manoj!



## Espéranto: vers une culture sociale sans frontières

# Une rencontre anationale de travailleurs et progressistes.

**Connaissez-vous une association dont les membres communiquent entre eux dans une seule langue — bien qu'ils soient de milieux linguistiques et de régions du monde les plus variés et malgré le fait que la plupart n'appartiennent pas à l'élite sociale de leur lieu de résidence respectif? C'est ainsi que fonctionne Sennacieca Asocio Tutmonda (association mondiale anationale), en bref SAT.**

SAT, fondée en 1921, est une association mondiale de travailleurs et plus généralement de progressistes dont l'activité est centrée sur l'éducation populaire. En tant qu'association mondiale avec adhésion individuelle — et avec de tels adhérents et un objet ainsi formulé — elle est unique. Les fils rouges qui tissent son histoire dès 1921 sont la solidarité des travailleurs et une activité d'éducation populaire auto-organisée fonctionnant par des contacts directs et horizontaux entre les membres. Ceci fait contraste avec l'internationalisme dans sa forme habituellement rencontrée (des contacts entre organisations nationales, dirigées par des «spécialistes» adéquats ayant des connaissances en langues étrangères). SAT résoud cela, à savoir le problème linguistique, par l'utilisation de la langue linguistiquement neutre Espéranto. L'un des fondateurs de SAT,

Eugène Lanti, expliquait à ce sujet: «La mise en contact des esprits entre les prolétaires des différents pays s'effectue en pratique seulement par l'intermédiaire d'intellectuels polyglottes. C'est pourquoi l'activité de SAT, ayant pour but d'unir, de rapprocher intimement et directement les travailleurs du monde entier, est essentiellement révolutionnaire.»

Par son caractère inter-individuel et l'absence de structuration reflétant les divisions nationales dans le monde, SAT se caractérise comme «anationale» et dépasse par là d'un cran l'«internationalisme». Cela explique son nom: Association Mondiale Anationale (Sennacieca Asocio Tutmonda).

SAT organise un congrès tous les ans dans un pays différent. Avec 70 participants, le 82e congrès s'est déroulé cette année à Milan du 18 au 25 juillet 2009. Comme toujours, la langue du congrès était l'Espéranto, avec bien sûr l'utilisation occasionnelle de l'italien pour la communication avec les représentants locaux (avec alors interprétation en Espéranto).

Qu'est-ce que l'Espéranto? L'Espéranto a été proposé en 1887 par Zamenhof, oculiste juif vivant dans la partie occidentale de l'empire russe (aujourd'hui Pologne). Il voulait faire évoluer et éprouver avec quelques

collègues une langue régulière, facile à apprendre, qui serait par la suite introduite comme seconde langue, internationale, pour tous. On appelle aujourd'hui une telle langue «langue planifiée». C'est une langue que son initiateur — aspirant à la suppression des barrières entre les peuples — a qualifiée tantôt d'«internationale» tantôt d'«anationale», une langue neutre en ce sens qu'elle est non nationale et non ethnique. Il cherchait par cela à contribuer à l'atténuation des conflits et à la paix. Une brèche dans ces barrières a déjà été réalisée par l'Espéranto: il est devenu une langue vivante transgénérationnelle apprise par des centaines de milliers de personnes du monde entier. Ces dernières sont en partie organisées en associations. SAT a environ 600 membres. La plus grande, l'Association Universelle d'Espéranto (UEA), a environ 6000 membres individuels dans 120 pays. L'Espéranto prouve continuellement son utilité. Il rend des services pratiques à ses utilisateurs et leur permet un style de vie beaucoup plus cosmopolite, transnational, que celui qu'ils pourraient atteindre sans lui.

Ce congrès-ci a été organisé par ARCI Esperanto, une des associations espérantistes de travailleurs en lien avec



SAT dont le champ d'action est des pays ou des territoires linguistiques. ARCI Esperanto est en même temps une branche de l'activité d'ARCI, Associazione Ricreativa e Culturale Italiana (Association Italienne de Culture et Loisirs). ARCI a près de 1.150.000 adhérents, répartis dans environ 6000 groupes locaux qui s'occupent entre autres de culture (art, cinéma/télévision, littérature/poésie, musique, théâtre/danse), de tourisme, de Droits de l'Homme, d'engagement social, du service civil et de solidarité internationale. ARCI, traditionnellement proche de



la gauche, participe au forum social mondial. Ce congrès a beaucoup contribué au renforcement des relations entre SAT et ARCI par la reconnaissance mutuelle des divers aspects complémentaires entre eux et du commun état d'esprit anational des deux associations, suite à quoi devraient naître, d'après plusieurs discussions pendant le congrès, quelques collaborations intéressantes. ARCI a, pour sa part, organisé quelques parties plus distrayantes du programme culturel du congrès: des excursions aux Îles Boromées sur le Lac Majeur [Lago Maggiore], en train de Domodossola à Locarno (Suisse), et des promenades sur des sites tantôt de la Renaissance, tantôt de la Rome Antique à Milan même.

Faisaient également partie de ce programme d'éducation populaire des conférences sur la position de Gramsci envers l'Espéranto, sur des auteurs (espérantistes) méconnus d'Ukraine, sur les luttes de classes aux Etats-Unis et sur les banques éthiques (ARCI participe activement à la *Banca Popolare Etica*). Des forums ont été tenus sur l'Amérique Latine, le Moyen-Orient et Madagascar, pendant lesquels l'auditoire a pu entendre une malgache décrire les derniers événements qui se sont déroulés dans cette grande île et répondre aux questions touchant divers sujets, réfléchir et débattre sur l'évolution de la situation politique en Amérique Latine et sur les diverses solutions possibles au conflit Israëlo-Palestinien — ces deux derniers thèmes ayant incité les membres à développer des contacts directs avec les habitants de ces régions pour acquérir plus d'informations sur ces sujets. Anna Löwenstein, écrivain espérantiste renommé, a présenté son nouveau roman historique en Espéranto sur l'empereur romain Néron, *Morto de artisto*. Parmi les soirées proposées il y a eu des concerts des groupes *La Vojirantoj* et *Rêverie*, qui ont très pertinemment illustré le thème très actuel du Congrès: «Voyager sans frontière, vivre sans nation», en rappelant aux congressistes la politique anti-immigration de l'Italie et de beaucoup d'autres régions dans un monde où les conditions de vie sont de plus en plus difficiles.

SAT essaie d'avoir un fonctionnement démocratique horizontal. Pour ce faire, une partie significative du temps et de l'énergie des congressistes est dédiée aux quatre assemblées générales matinales, au cours desquelles les membres s'informent et s'expriment sur tous les aspects de l'activité associative, formulent des questions et donnent mandat au Comité Exécutif.

Pour quelques sous-groupes de SAT et pour les organisations liées à SAT, le Congrès de SAT représente l'opportunité de faire une réunion annuelle. Ainsi se sont réunis par exemple :

*ARCI Esperanto*, et aussi des «fractions» de SAT — qui sont en fait des plate-formes de personnes de mêmes tendances et dont le rôle est entre autres de se mettre en relation avec d'autres groupes analogues en dehors de SAT: il y avait au congrès les fractions Pacifiste, Communiste, Libertaire et Anationaliste de SAT. La Fraction Pacifiste mène une campagne pour la Convention d'Oslo contre les armes à sous-munitions, invitant à agir pour qu'un maximum d'états signent et ratifient cette convention. Des membres de la Fraction Communiste ont rencontré, quant à eux, Alessandro Rizzo, un conseiller de quartier de l'opposition et membre du parti alternatif de gauche «Gauche Démocratique». Du côté des anationalistes, il s'agit d'un courant idéologique qui comprend l'universalisme, un anti-nationalisme radical et l'utilisation pratique de l'Espéranto comme instrument d'éducation pour penser anationalement.

On peut constater une vigueur nouvelle dans l'ambiance interne générale malgré la faible participation numérique au congrès (environ 70 personnes, ce qui est beaucoup moins que dans les décennies passées), et de nouveaux projets éclosent. On distingue notamment les résultats de la Coopérative d'édition de SAT qui développe depuis quelques années son activité et a édité cette année encore deux livres importants



particulièrement d'actualité: **Abrégé du Capital de Karl Marx** de Carlo Cafiero, qui est une synthèse concise et pratique du premier livre du *Capital*, et **Plan B - Mobilisation pour sauver une civilisation** de Lester R. Brown, qui

est une description synthétique mais complète de la crise mondiale générale (écologique, sociale, économique etc) et des solutions possibles pour la limiter. L'avenir de SAT semble assez prometteur, d'autant plus que le travail à faire est grand dans une situation mondiale sous tension: la conscience d'elle-même grandissante de SAT ces derniers temps en même temps que la réaffirmation de ses buts originels ont créé un état d'esprit dans lequel elle se démarque un peu plus du mouvement espérantiste. Cela lui redonne une place de partenaire autonome de débat.

Il apparaît que quelques aspects et quelques thèmes traditionnels de SAT s'accordent bien avec quelques formes d'activité et thèmes de plus en plus populaires de la gauche:

- le désir de diverses tendances organisées politiquement d'avoir des rapports non dogmatiques et non sectaires entre eux,
- la collaboration organisée par internet et dans l'esprit de démocratie horizontale entre gens de tendances diverses et
- un anti-nationalisme qui petit à petit — à côté de mouvances comme l'anti-racisme et l'anti-sexisme — devient l'une des colonnes de l'action de la gauche, comme il l'a été dès le premier jour à SAT.

Le fameux slogan «Travailleurs du monde entier, unissez-vous!» est de nouveau en 2009 — bien qu'à petite échelle — devenu une réalité à Milan, renforçant l'espoir en la capacité de l'humanité à construire dans l'avenir un monde plus juste et sans classe.

**Traduction par SAT-Amikaro (Union des Travailleurs Espérantistes de Langue Française)**

Texte original en espéranto:  
<http://satesperanto.org/Gazetartikolo-2009.html>





# ...ça bouge partout...

■ **Le Télégramme du 16 juillet** publie un article sur un certain "Projet EsPeRanTo", où il est expliqué : « Nous voulions reprendre le concept de la langue espéranto qui est un lien entre les peuples, mais en l'appliquant aux biens les plus précieux de l'humanité, dont l'eau ».



## Projet Espéranto.

### Fin de l'étape hillionnaise

Dimanche matin, les membres du conseil municipal enfants, leurs parents et la municipalité avaient un dernier rendez-vous avec l'équipe de tournage du projet Espéranto. Après une dernière prise de vue autour de la chapelle Saint-Maurice, à Morieux, Blandine Magnette, directrice de la Maison de la Baie, les a accueillis devant l'exposition de photos et commentaires des enfants sur le problème spécifique des algues vertes, la pollution locale de l'eau.

### Les enfants vecteurs de communication

Anne Charlotte, porte-parole du groupe qui va bientôt mettre le cap sur le Maroc, explique : « Nous voulions reprendre le concept de la langue espéranto qui est un lien entre les peuples, mais en l'appliquant aux biens les plus précieux de l'humanité, dont l'eau ». Tous les intervenants, dont Yvette Doré ou Pascale Sanvoisin, ont souligné « la prise en charge par les enfants du concept environnemental. Le film qui va en découler n'est pas un document d'adultes utilisant les enfants, mais un document qui vient des enfants et qui s'adresse à tous les publics ».

### Premiers résultats à l'automne

À l'automne, l'équipe du projet Espéranto devrait fournir un document en images concernant la première partie du projet (hillionnaise). Ensuite, il faudra attendre le retour de l'équipe du Maroc, du Sénégal, de la Guyane et la Guadeloupe, dans un an (au mieux). Il faudra donc patienter jusqu'à 2011 pour voir le film qui retrace tout le projet.

Source : <http://saint-brieuc.letelegramme.co...>  
Le site du Projet EsPeRanTo : <http://www.projet-esperanto.fr/>

## ■ TV Esperanto Bjalistoko

A l'occasion du 94e Congrès Universel d'espéranto qui a eu lieu en juillet 2009 à Bialystok, ville natale de Zamenhof (initiateur de l'espéranto dont on fête cette année le 150e anniversaire), les organisateurs ont lancé une émission bimensuelle en espéranto pour informer régulièrement le public des préparatifs avant le congrès et rendre compte des événements après.



Les dernières émissions :

<http://www.tvbialystok.pl/tvesperanto/programy>

La page d'accueil du site hébergé par TV Bialystok :

<http://www.tvbialystok.pl/tvesperanto/>

■ **La Dépêche du 24 août** publie un article intitulé «*Villeneuve-D'aveyron : Le marché du livre a vivement intéressé*» dans lequel A. Andrieu est cité comme «*écrivain d'espéranto*». Il est effectivement auteur de *Kiel traduki sesdek franclingvajn vortojn* (Comment traduire soixante mots français), livre paru en avril 2009, recueillant les textes parus dans la rubrique éponyme tenue par André Andrieu dans La Sago, le mensuel de SAT-Amikaro.

*Autour du maître romancier Daniel Crozes, les auteurs locaux, les écrivains d'espéranto tel A. Andrieu ou historiens de notre Rouergue, dont le nouveau D. Brillat, ont rencontré une foule de lecteurs, amateurs de belles lettres, ajoutant à ce dimanche matin, sur la place des Conques, emplies de vendeurs de produits du pays et ses merveilleuses arcades moyenâgeuses, une animation particulièrement originale et festive*



■ **Paris 4e (75), 06 novembre 2009 : 6e "Café Espéranto"** (1er vendredi du mois), à « La commune » (café associatif du 12ème). pour :

- Parler en Espéranto...
- ou "essayer" de parler...
- ou s'informer et informer à propos de l'Espéranto...
- feuilleter des publications diverses et montrer celles qu'on possède soi-même...
- boire un pot convivialement...

NB : Ce RDV est également annoncé sur <http://www.lernu.net> et <http://www.ikurso.esperanto-jeunes.org>.

Il y aura donc, comme d'habitude, plusieurs dizaines de participants, de tout niveaux en espéranto... dont des "bons" et généralement quelques "étrangers", permettant réellement de tester en pratique la langue !

BIENVENUE aussi aux débutants ou "simples curieux". N'hésitez pas !



**PLI FACILA x 10**

(Easier / einfacher / plus facile / più facile / más fácil...)

**PLI JUSTA x 100**

(Fairer / gerechter / plus équitable / più giusta / más justa...)

■ **Dans le numéro 371 de septembre 2009 de la revue «Silence»**, une annonce de stage d'espéranto est visible dans la rubrique agenda, p30 :

*Toulouse : espéranto, 7 au 11 septembre, stage d'initiation et cours de perfectionnement, priorité aux cheminots. ACFE, association française des cheminots pour l'espéranto,*

Silence, revue d'écologie / alternatives / non-violence, publie régulièrement des annonces sur des sujets relatifs à l'espéranto.

Plus d'info sur Silence : <http://www.revuesilence.net/>



## Commémoration du 150<sup>e</sup> anniversaire de la naissance de Louis-Lazare Zamenhof (1859-1917), initiateur de l'espéranto

Espéranto '94 A mis à profit cet anniversaire pour proposer deux expositions sur l'Espéranto qui ont eu lieu :

- du 8 au 19 septembre à la Médiathèque, espace Molière rue Antoine Pinay (14-16 avenue Wladimir d'Ormesson) à Ormesson sur Marne.

pour clore cette exposition, une conférence animée par Thérèse Sabatier a eu lieu dans la salle d'exposition, le Samedi 19 septembre à 15 heures.

- du 14 au 26 septembre à la Maison du Citoyen et de la Vie Associative, 16 rue Révérend-Père Lucien Aubry, 94120 Fontenay sous Bois.

Vernissage et Conférence le mardi 15 septembre à 18 h 30, avec la participation d'André Cherpillod (Membre de l'Académie d'Espéranto) sur le thème suivant : Le problème des langues en Europe.



À l'occasion de cet anniversaire **La Bellevilloise** a accueilli deux concerts exceptionnels en Espéranto :

- Le Samedi 19 septembre de 19H à 20H à la Halle aux Oliviers, (entrée 21, rue Boyer) 75020 Paris, avec **FAMo**, accompagné par **M. Tarek**, (darbouka, saxophone), dans le cadre de la Journée du Patrimoine à La Bellevilloise, organisée par l'Association d'Histoire et d'Archéologie du Vingtième arrondissement. L'entrée était gratuite.

Plus d'infos : <http://ahav.free.fr/rentree2009.htm>

- Le Samedi 26 septembre de 20H à 22H (même lieu) toujours avec **FAMo** accompagné par **M. Tarek**, mais avec aussi **Francis Soghomonian** et **Philippe Blanchard**, dans le cadre de la Journée intergénérationnelle organisée par l'association «Ensemble demain»

La aussi, entrée gratuite.

Plus d'infos : <http://ahav.free.fr/Journ-e%20inter...>

Vous vous souvenez de Mramba Simba ? Et de Mazingira ?

Eh bien grâce à l'Espéranto une équipe d'Electriciens sans Frontières (ESF) Pays de la Loire va se rendre en Tanzanie dans les 5 villages de Salama afin d'étudier les possibilités d'électrification des 5 écoles et dispensaires .

À notre retour nous ferons une information sur la situation à Salama, en particulier vers tous ceux qui soutiennent des orphelins.

plus d'infos:  
[maurice.foucher@cegetel.net](mailto:maurice.foucher@cegetel.net)  
[www.mazingira.be](http://www.mazingira.be)

**SAT Amikaro organisera son congrès annuel 2010 à Hillion, charmante presque à proximité de St Brieuc et en bordure de sa baie, dans les Côtes d'Armor.**

Ces derniers temps, Hillion devient célèbre en France pour ses algues vertes et ses dangers. Avec l'appui des élus locaux, notre congrès permettra de donner une toute autre image de la commune au-delà des frontières de notre hexagone.

L'association Espéranto 22 concocte ce congrès, sous la houlette d'un comité

d'organisation.

Chaque mois, votre revue préférée, la Sago, vous révélera des informations sur la région, ses illustres écrivains, les acteurs locaux, les thèmes proposés pour les débats, les excursions, ... En décembre, les lecteurs recevront les bulletins d'inscriptions ainsi que les dispositions pratiques.

D'ores et déjà, nous vous invitons à réserver votre galette bretonne et surtout vos dates du 3 au 6 avril 2010.

(Photos et annonce en espéranto p. 16)

### Renseignements utiles

#### Permanence au siège

Lundi 18h30 - 19h30  
Mardi 10h00 - 16h00  
Mercredi 14h30 - 18h00  
Jeudi 15h30 - 18h30  
Vendredi 09h30 - 19h30  
Samedi 11h00 - 18h00

#### Cours oraux au siège – pour débutants:

**Les lundis** 17H30 avec Georges Meilhac  
**Les mercredis** 14H30 avec Hélène Bonjour.  
**Les samedis** 15H00 avec Vincent Charlot

#### Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

**C. Gerlat** 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 0476 01 91 71 [claude.gerlat@orange.fr](mailto:claude.gerlat@orange.fr)

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

#### Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: [libroservo@sat-amikaro.org](mailto:libroservo@sat-amikaro.org)

### Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à [lasago@aliceadsl.fr](mailto:lasago@aliceadsl.fr), en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.

- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

#### Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE : SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris  
SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

**LA SAGO.** CPPAP n° 0307 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

Dépot légal à parution.

**LA SAGO - Octobre 2009.**

Espéranto

vers une culture sociale sans frontières

# Utilaj informoj

<b>Sidejo:</b>	Lunde	18h30 - 19h30
<b>deĵor-</b>	Marde	10h00 - 16h00
<b>horoj</b>	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

## Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

## Parolaj perfektigaj kursoj ĉe la sidejo

**ĉiun merkredon**, je la 16a, kun Thérèse Pinet, **ĉiun ĵaŭdon**, je la 16a, kun Élisabeth Barbay, kaj **ĉiun vendredon** je la 18a, kun Vito Markovo.

La Babilrondo de SAT-Amikaro okazas **ĉiun unuan merkredon** de la monato, je la 17a kaj duono, kun Thérèse Pinet.

## ■ Perkorrespondaj kursoj, dua kaj tria grado:

Claude Gerlat  
38 €. (senlaboruloj kaj ĝis25jaraĝaj junuloj : 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

**Pedagogio:** Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

**Kotizoj 2008 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€**

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 € ; Svisio : 3,80 F.S. ; aliaj landoj: 4,60 €.

**Abono 2008 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio : 32 €; Svisio : 43FS; aliaj landoj : 39 €.**

### Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro  
CCP: 37 852 90 L La Source.  
N° IBAN, (por pagi el fremda lando):  
SAT-AMIKARO.  
FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314  
BIC: PSST FRPPSCE

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean :  
Poŝta konto n° 23-14908-9.

## Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto : Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Korektskipo : Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'

Helpas al la korektado: Janine et Yannick Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet, Maksimiliano Gverino, Vinko Markovo

## KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al [lasago@aliceadsl.fr](mailto:lasago@aliceadsl.fr), **tekstoj** en RTF aŭ TXT formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj per ajna sistemo de ĉapeligo (sed Unikodo preferata), bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir' (ne tajpitaj kontribuajoj publikeblas nur se troveblas volontula tajpanto)

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.**

**Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto**

## Adresaro

**La SAGO-abonoj: ĉe la sidejo,**

**La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.**

**Sidejo de SAT-Amikaro:** 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris  
Tel. : 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02  
TTT-ejo : <http://www.esperanto-sat.info>  
Retpoŝt-adreso: [sat-amikaro@wanadoo.fr](mailto:sat-amikaro@wanadoo.fr)

**Claude Gerlat** 11 bd Maréchal Leclerc  
38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Retpoŝt-adreso : [claudergerlat@orange.fr](mailto:claudergerlat@orange.fr)

**Mireille Grosjean** : Grand-rue 9, CP 9  
CH-2416 Les Brenets

**Clémentine Staquet** (Esperanto-Infor)  
14 rue du Loutrier BE-1170 Bruxelles

**Serge Sire** (Serĝo Sir')  
85 impasse des Fées 74330 Sillingy  
Retpoŝt-adreso : [lasago@aliceadsl.fr](mailto:lasago@aliceadsl.fr)

**SAT: Abono al "Sennaciulo" 2009: 57 €**

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly  
p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen  
p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

## Kiel traduki Tête

La franclingva vorto **tête**, kiel ĝia plej komuna traduko **kapo**, havas kvar grupojn da signifoj: parto de la korpo, sidejo de la penso kaj de la psiko, simbolo de la individuo kaj plej alta aŭ plej antaŭa parto de io. Tamen ne ĉiam oni povas traduki **tête** per **kapo**, ĉar en multaj figuraj lokucioj alia vorto estas pli komprenebla internacie.

Ni konsideru unue ekzemplojn, en kiuj **tête** montras parton de la korpo, de homo aŭ de besto:



La tête d'un oiseau.	La kapo de birdo.
L'aigle à deux têtes.	La dukapa aglo.
Manger de la tête de veau.	Manĝi bovidan kapaĵon.
De la tête aux pieds.	De la kapo ĝis la piedoj.
Il a mal à la tête.	La kapo lin doloras.
La tête lui tourne.	Li sentas kapturnon.
Il garde la tête haute.	Li plu tenas la kapon levita.
Hochoer la tête de droite à gauche pour dire non.	Nee skui la kapon de dekstre maldekstren.
Faire un signe de tête.	Signi per la kapo.
Il ne raisonne plus, il est tombé sur la tête.	Li ne plu rezonas, li perdis sian kapon.
Se taper la tête contre les murs.	Senespere kapfrapi la murojn.
Se jeter tête baissée dans quelque chose.	Entrepreni ion senpripense.
Ne savoir où donner de la tête.	Esti superŝutita de okupoj.
J'en ai par dessus la tête.	Mi ne povas plu elteni.
Tenir tête à l'adversaire.	Elteni la kontraŭulon.
Risquer sa tête.	Riski sian vivon.
Je donne ma tête à couper que c'est vrai.	Estu mia kapo dehakita, se tio ne estas vera.
Je le jure sur la tête de mes enfants.	Mi ĵuras tion per la kapoj de miaj infanoj.
Il a une bonne tête.	Li aspektas simpatia.
Faire une drôle de tête.	Havi strangan mienon.
Faire la tête.	Kolermutiĝi.
J'ai vu cette tête-là quelque part.	Mi jam ie vidis tiun vizaĝon.
Être la tête de Turc.	Esti regule mokata.
Une tête de mort.	Homa kranio.
Il a une tête de plus que sa sœur.	Li estas per unu kapo pli alta ol lia fratino.
Un cheval qui gagne d'une courte tête.	Ĉevalo gajnanta per apenaŭ unu kapo.
Ce footballeur a marqué le but d'une tête.	Tiu futbalisto enpafis la golon per kapobato.



# LibroServo

## Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris  
 Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;  
 Sabate 11H-18H)  
 Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org  
 CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G



Sendkostoĵoj  
 Al ĉiu mendo aldonu:  
 40% ĝis 5€  
 35% ĝis 10€  
 25% ĝis 20€  
 20% ekde 20€

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00
Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

A  
B  
C  
D  
E  
F  
G  
H  
I  
J  
K  
L  
M  
N  
O  
P  
Q  
R  
S  
T  
U  
V  
W  
X  
Y  
Z

En dua grupo da lokucioj *tête* estas rigardata kiel la sidejo de la penso aŭ de la psiko:

Plutôt la tête bien faite que bien pleine.	<b>Estu kapo tre klera, prefere ol nur tre plena.</b>
Être tête en l'air.	<b>Esti senpripensa.</b>
Avoir une tête de linotte.	<b>Esti ventkapulo.</b>
C'est une grosse tête.	<b>Li estas multescia.</b>
Il a la grosse tête.	<b>Li estas malhumila.</b>
Il n'a pas de tête.	<b>Li estas sencerba.</b>
Une femme de tête.	<b>Kapabla kaj firma virino.</b>
Calculer de tête.	<b>Kalkuli en la kapo.</b>
Se creuser la tête.	<b>Rompi al si la kapon; cerbumi.</b>
Il a une idée derrière la tête.	<b>Li havas kaŝitan intencon.</b>
Se mettre dans la tête que c'est faux.	<b>Enmeti en sian kapon, ke tio estas erara.</b>
Mettez vous bien cela dans la tête!	<b>Enbatu tion en vian kapon!</b>
Ce travail me prend la tête.	<b>Tiu tasko obsedas min.</b>
Je n'ai plus son nom en tête.	<b>Mi ne plu memoras lian nomon.</b>
Avoir la tête froide.	<b>Esti senemocia.</b>
Il a une tête de cochon.	<b>Li havas obstinan kapon.</b>
Devant le danger il perd la tête.	<b>Fronte al danĝero li ne plu regas sin.</b>
Mettre à quelqu'un la tête à l'envers.	<b>Konfuzi ies menson.</b>
Avoir la tête à ce qu'on fait.	<b>Koncentri sian atenton sur sian okupon.</b>
Avoir la tête ailleurs.	<b>Havi aliajn aferojn en la kapo.</b>
N'en faire qu'à sa tête.	<b>Agi laŭ siaj kapricoj.</b>
Un coup de tête.	<b>Facilanima decido.</b>
Ce vieillard a perdu la tête	<b>Tiu maljunulo perdis la kapon; .... la saĝon.</b>
Il a encore toute sa tête.	<b>Li ankoraŭ havas klaran kapon.</b>




(Daŭrigota)  
 Andreo Andrio


## Novajoj/Ree mendeblaj



Poŝamiko  
 Beatrice Allée & Katalin Kováts  
 40 paĝoj 6€



Vivo de Andreo Cseh  
 Ed Borsboom  
 313 paĝoj 18,00€



Vortoj de Andreo Cseh  
 Andreo Cseh  
 206 paĝoj 16,00€



Esprimo de sentoj en Esperanto.  
 Edmond Privat.  
 IEI. Hago. 2000 (5a eld).  
 56 paĝoj. 6.00 €  
 Klarigo: Eseoĵ. Klasika studo.

## Otava tramposindikato

### La ruĝbenketa lifto

Recenzo

Verkis Suada Tolo-Walzmann, tradukis Raneto, reviziis Nimfeo, eldonis Esperanto-Solidareco, 2009. 92 paĝoj, 7 eŭroj.

Ĉi tiu libro, verkita de aŭtorino el Bosnio nun loĝanta en Bretonio, rakontas la travivaĵojn de dek jarojn aĝa knabo, Birnezo, kiu spertas el Sarajevo la ekon de la jugoslavia milito de 1992. La verko priskribas, en realisma maniero kvankam per infanaj okuloj, la vivon en kaj ĉirkaŭ la urba biblioteko, kiu spertas detruigon pro bombado.

La libro facile legiĝas, ĉar la traduko estas verkita en simpla kaj klara lingvo, kio ja gravas por infanoj, sed ankaŭ utilas por ĉiuaĝaj progresantoj. Kvankam la temo estas plej serioza, ankaŭ ne mankas humuro, interalie dum priskribo de la fotokopio de la ĉefrolulo...

El enhava vidpunkto mi tamen iom bedaŭras la malprecizecon de kelkaj klarigaj notoj pri historiaj punktoj. Ankaŭ iom frustris min la silentado pri la kaŭzoj de la militoj kiu aperas kiel natura katastrofo, kiun helpis kuraci eksterlandaj UNO-soldatoj kaj ĵurnalistoj tute neŭtralaj kaj bonvolemaj. Nu, konsentite, al multaj ŝajne la afero efektive aperis tiel, kaj al scivoluloj nenio malhelpas kompletigi siajn sciojn per aldonaj legaĵoj.

Ĉiukaze ĉi tiu traduko ja kontribuis ŝtopi la tro grandan breĉon en la nuna porinfana esperantlingva legomaterialo, kaj ĝia enhavo povas samtempe konsistigi indan deirpunkton por debato pri «kia estu nefikcia porinfana libro?»

Vinko Markovo

La Otava tramposindikato (Ottawa Panhandlers Union) kreiĝis komence de 2003. Ĝi estas sekcio de Industrial Workers of the World. Andrew Nellis estas unu el la ĉeforganizantoj, delegito de sia sekcio kaj proparolanto de IWW.

La sindikato ne estas kutima laborista sindikato ĉar ĝia celo ne estas intertrakti kun tria rolulo por kolektivaj kontraktoj kaj pli altaj salajroj. Ĉi tiu fuŝkoncepto kreis ridindajn miskomprenojn, kaj eĉ atakon kontraŭ la grupo flanke de otavaj sindikatoj kiuj demandis kial la trampo batalas: ĉu pli larĝaj trotuaroj?

La sindikato respondis al tiuj akuzoj per ĉefartikolo titolita «Kial la trampo bezonas sindikaton» (Why Panhandlers Need a Union) kiu aperis en ilia gazeto la 20an de marto 2006. La ĉefartikolo estis kunlabore verkita de kelkaj IWW-anoj. Sed oni suspektas, ke ĝin verkis la almozpetanto Proshanto Smith.

La sindikato celas instigi la trampojn, la strat-artistojn, kaj iun ajn, kiu pasigas multan tempon surstrate, unuigi antaŭ la enirejo de la urbodomo por batali por individuaj rajtoj kaj por nuligi iujn leĝojn, kiuj estis starigitaj de la urbestro. La sindikato ĉiam emfazis, ke ĝia celo estas krei «entrepreneman spiriton», kiu celus instigi la almozpetantojn vendi artaĵojn kaj metiistaĵojn, librojn, KDiskojn aŭ ion ajn, kio enspezigas monon, kiun ili bezonas por pluvivi.

La kreado de la tramposindikato kuraĝigis aliajn aktivulojn, kiel tiu de la Kolektivo Sub Premo krei proprajn sindikatojn por apartaj grupoj.

La unuan de majo 2006, Andrew Nellis, kunlabore kaj helpite de la otava sekcio de IWW, organizis manifestacion de la tramposindikato dum la unua de majo kaj senperforte blokis straton dum unu horo, apud loko kie okazis kunpuŝigoj inter junaj vaguloj kaj la sekurec-respondeculoj. La rekta ago ankaŭ celis la Leĝon pri Sekuraj Stratoj, kiun la trampo forte kritikis ĉar maljuste celis la malriĉulojn. Ĝi celis ankaŭ regularon starigita de la Otava urbestro, kiu eksterleĝigis la vendadon de ĵurnaloj surstrate. La almozuloj kaj senhejmuloj tiam vendis la alternativan gazeton el Halifakso, Dominion Newspaper. Novaj leĝoj, validaj de la unua de majo, ja celis limigi tion.

La unuan de junio 2006, dum manifestacio okazis amasalmozpetado. Tiu ĉi protestis kontraŭ alia leĝo de la otava urbodomo kiu malpermesis la vendon de artaĵoj kaj metiistaĵoj kaj la disdonon de gazetoj fare de malriĉuloj. La amaskomunikiloj eldonis citaĵojn de Nellis kaj de la sindikato pro tiuj agoj - «La otavaj senhejmuloj diras ke

ili perturbos la urban komercadon se la komercistoj plu perturbos iliajn aferojn.

### La leĝoj kaj la tramposindikato

Regularo No. 2005 - 358:

Temas pri regularo starigita de la otava urbestro, kiu limigas la vendadon ĉe la stratoj. La vorto «strato» en tiu regularo ne taŭgas, ĉar la leĝo difinas la «stratojn» kiel publikaj kaj komunaj stratoj, kaj enkalkulas pontojn, viaduktojn kaj aliajn stratajn strukturojn.

Ĉi tiu regularo estis starigita la 24an de aŭgusto 2005 sen publika konsultado.

La leĝo malpermesas la vendadon de artaĵoj kaj metiistaĵoj, floroj, stratgazetoj, kaj surstratajn teatraĵojn.

La «Safe Streets Act» (leĝo por sekuraj stratoj):

La leĝo por sekuraj stratoj estis starigita de la konservativa registaro de Mike Harris en 1999, kiu koncernis la tutan Ontarion. Ĉi tiu leĝo celas malaperigi la «agreseman almozpetadon» sed la leĝo ne klare difinis la «agreseman almozpetadon». La leĝo nur diras, ke la almozpetado iĝas agresema kiam ĝi devigas prudentulon zorgi pri sia sekureco. Tio estas tre malpreciza ĉar ne ĉiuj sentas sin minacataj en la samaj situacioj. Iuj prudentuloj sentas sin minacitaj simple kiam trampo petas de ili kelkajn monerojn, dum aliuoj senprobleme donas monon al uloj, kiuj tion bezonas. La tramposindikato opinias, ke la celo de la leĝo por Sekura Almozpetado ne estas ĉesigi pasivan almozpetadon, sed ja ĉesigi ĉian almozadon, ĉu aktiva aŭ pasiva.

En Otavo, la anoj de la tramposindikato kapablis respondi al la provokoj de la otava polico konservante en poŝo kopion de la Leĝo por Sekuraj Stratoj kaj montrante ĝin al policistoj por pruvi ke ili ne perfortas la leĝon. Tamen, almozuloj devas pagi monpunojn pro almozpetado, kiun ili ne kapablas pagi.

Cetere, ĉi tiu leĝo ne koncernas la karitatajn kompaniojn, kiuj petas monon de homoj. La fakto, ke oni permesas al la karitataj kampanjoj peti monon surstrate, montras la klasan flankon de la Leĝo por Sekuraj Stratoj.

Estas maljuste, ke la otavaj trampo devas pagi dekduojn da monpunoj por la leĝo. La Programo kontraŭ la monpunoj estis starigita responde; sociaj aktivuloj provis nuligi la monpunojn donitajn al trampo. Ĉi tiu programo estas tre fruktodona tie, kie ĝi enradikiĝis.

Laŭ artikolo de Fr:Wikipedia "Syndicat des clochards d'Ottawa" tradukis Phil Guichet, Maksimiliano Gverino kaj Vinko Markovo

# Esperantistoj aktivas

**Baugé (49)**

## MIREGE

*Muzikaj, Internaciaj, Renkontiĝoj Esperantaj por Gejunuloj Europaj*

En januaro 2009, projekto pri renkontiĝo inter esperantaj eŭropaj junuloj naskiĝis. MIREGE ĝi nomiĝas kaj en la muzika centro de Baugé (49) okazos de la 24-a ĝis la 31-a de oktobro 2009.

Esperanto-France organizas MIREGE-n kaj Franjo Leveque ĝin estras. Tiu projekto jam ricevis apogon kaj gravan subvencion de Eŭropo tra ĝia franca agentejo, de la regiona konsilio, de la urbo kaj de pluraj esperantaj asocioj.

Ĉiuj tiuj monhelpoj ebligas 34 gejunulojn el 7 eŭropaj landoj partopreni en la semajna renkontiĝo. Ili kune preparas publikan ekspozicion, debatos kun elektitoj pri la temo «En eŭropo, ĉu ni havas samajn rajtojn kaj eblojn?», proponos muzikan kaj dancan prezentadon al publiko. Tiele, la junuloj konkrete interkonatiĝos kaj interŝanĝos pri siaj eŭropa kaj monda civitecoj.

*En via kalendaro: la 30-a de oktobro je la 18-a, dato de la publika prezentado de la junuloj en la urba spektakla salono René d'Anjou en Baugé.*

## 5000 kilometroj per « la verda buso » tra Eŭropo

1900 esperantistoj, veninte el 62 landoj, partoprenis dum unu semajno la Universalan Kongreson de Esperanto en Bjalistoko, pola urbo kie naskiĝis en 1859 Doktoro Lazaro Ludoviko Zamenhof, iniciatinto de tiu lingvo.

Foririnte en « la verda buso » kun 3 bezieranoj kaj 48 «esperantistaj geamikoj», mitrairis Francion, Germanion, Ĉeĥion kaj Pollandon. La universitata centro akceptis la kongreson, mirindan miksaĵon de individuoj, kiuj libere kaj facile interkomunikas pere de Esperanto, nia komuna lingvo. Tio aspektas vigle, bunte, vivece, varme, gaje. Japanoj ne formetas siajn ĉapelojn, indoneziano surmetas longan ĉemizon, ĉinoj buntajn robojn. La adoleskantoj preferas larĝajn pantalonojn kaj aŭskultas kun granda miro la maljunajn partoprenantojn rakonti pri siaj iamaj kongresoj. Por vojaĝi, ili lernas la lingvon pere de Interreto, sed ne konas la historion de la movado.

En tiu homa bunteco, aŭdiĝas nur unu lingvo, Esperanto ; ne necesas interpretistoj, nek tradukistoj. Foje, mi « krokodilas » (tio signifas paroli sian propran lingvon), iranano petas min afable « Ne, parolu en Esperanto ».

Mi babilas pri la Usono de Obamao kun junulo naskiĝinta en Aŭstino (Teksaso), edziĝinta kun polino el Vroclavo. Ili renkontiĝis en kongreso en Finnlando kaj diris « jes » al la urbestro. Kun babilema italino, mi komparas la malmeritojn de niaj respektivaj prezidentoj. La britoj, multnombraj, aktive partoprenas la

29 kunvenojn, debatojn, prelegojn organizitajn pri tre diversaj temoj.

En la « libro servo », mi ne scias kion elekti : libroj, diskoj, ludoj, vidbendoj, kiom da riĉeco !

Tiu paca mondo, pri kiu parolis Zamenhof

Spite mian lacecon, mi maltrafas neniujn el la vesperfestoj : kantoj, koncertoj, teatraĵoj, kaj eĉ balo.

La nepo de Doktoro Zamenhof, Kristofa Ludoviko Zaleski Zamenhof, nura elsavito kun sia patrino, el familio amasmurdita (kiel multaj esperantistoj) de la naziuloj, malfermis la kongreson kun sia filino.

Emociiga momento, same kiel tiu de la fermo, okaze de la transdonado de la flago al la reprezentanto de Kubo, kie okazos la kongreso de 2010, antaŭ tiu de 2011 en Kopenhago.

Same ĝojigaj estis la infanoj, kiuj vivis laŭ sia ritmo, kantis, ludis, recitis en Esperanto. Ili estas la estonto kaj konstruos tiun pacan mondon, pri kiu parolis Zamenhof en siaj verkoj, « kiam la popoloj povos libere interkompreniĝi, tiam ili ĉesos malamikiĝi ».

Kun miaj kamaradoj, mi partoprenos, la 12an de septembro, en la Aleoj de Asocioj, en Beziero, por akcepti la estontajn esperantistojn. « Rendezvous ĉe nia budo, ĝis baldaŭ »

**Line Maurel**

Traduko (far Roland Cuenot) de artikolo aperinta franclingve en « L'Hérault du Jour », la 8an de aŭgusto 2009

## En apoteko, post televida elsendo

Mi bedaŭras...  
Ne ekzistas vakcino kontraŭ psikozo

IMUNIĜU KONTRAŬ GRIPU




## Selle Humuraĵoj



## Libertempo scienca

Saluton!  
Mi estas profesoro en Oksfordo.

Bonege!  
Sciante ke troviĝas tri miliardoj da stafilkokoj ĉe la elfluejo de kloako, Je la kioma antraksoj kaj furunkoj trafos nin ?



# Bonvenon en Hiliono (Hillion)

## La originoj de Hiliono apud San-Briego (kelte: Bioko)

La preciza origino de la nomo ne estis trovita per bela fabelo. Oni rakontas ke Hiliono devenas el la antikva ILION, fama urbo de la Malgranda Azio kiu estis detruita de grekoj.

Ĝiaj loĝantoj forflugintaj surŝipe, estus trairintaj la mediteraneon kie ŝtormego disigis ilin.

Kelkaj, trairinte la markolon de Ĝibraltaro, suprennavigis laŭlonge de Atlantiko, kaj poste de Maniko kaj grundis al Lermot. Tiuj elsavitaj establiĝis surloke, nomis la regionon Hiliono sed tio estas nur fabelo.

Laŭ la brioka kroniko, ĝi nomiĝis ankaŭ «Vetus Stabulum» kiu signifas «malnova stalo»

Historie neblas difini la nomoriginon de nia urbo. Ĉio estas nur fabelo aŭ hipotezo(\*).

Ĉiamaniere nia komunumo estas tre antikva ĉar oni tie malkovris silikajn tranĉilojn kaj poluritajn hakilojn datiĝantajn de la keltoj (650 jarojn antaŭ nia erao) poste, bronzajn hakilojn. Ankaŭ certas ke la Romianoj (50 jarojn antaŭ nia erao) okupis ĝin, ĉar estis trovitaj moneroj kun frontaj imperiestraj figuroj, kaj ĉe Grandville, postrestaĵoj de urboj kaj temploj; romia vojo trairas ĝin je kvin kilometroj.

## Geografia situo

La komunumo Hiliono estas duoninsulo oriente de San-Briego, funde kaŝita ĉe la golfeto «Ifiniac -Yffiniac». Duonĉirkaŭita nord-okcidente de la maro «Maniko»; okcidente trapasita de la rivero «Le Gouessant», kaj sude de la rapida aŭtovojo «Rennes-Brest»

Sen altaj reliefoj, multe da montetoj ornamas la komunumon trapasitan de nur unu rojo de «Saint-René», nomata «rojo de la Cré»; ĝi enfluas la maron ĉe la strando (la nomo de tiu loko estas ankaŭ «les Grèves»).

La natura rezervejo de la Sanbriega golfeto, kreita oficiale en la jaro 1980, etendiĝas laŭlonge de 12 kilometroj ĉe la marbordaj plaĝoj nomitaj «L'hotellerie», «Lermot», «Bon Abri» kaj «la Grandville».

## Loĝkondiĉoj

La komunumo entenas du grandajn urbizitajn grupojn, nome «vilaĝego» kaj «San Rene» La aliaj dispartiĝas en la agrabla kamparo.

## Marlaboristoj

La ĉefa aktiveco rilate la maron estas la mitulbredado en zono nomita Bona Ŝirmo (*Bonabri*).

La mitulbredistoj estas markampanoj



kaj la strando ilia vasta ebena kampo, kie ili diligente laboras tage aŭ nokte laŭ la horo de tajdo. Ili uzas multekostajn amfibiajn veturilojn, kiuj aspektas kiel grandaj platŝipoj kun radoj.



Laŭ la sezono kaj laŭ la tajdo la mitulbredistoj enigis (aŭ eligas) altajn fostojn en (el) strandon, zorgas pri la mitullarvoj fiksitaj sur ŝnurojn, al kroĉas la ŝnurojn helice ĉirkaŭ la fostojn, surmetas protektantajn retojn, kolektas la plenkreskintajn mitulojn ktp...



En «bona» jaro, la produktado atingas 4000 tunojn da mituloj.

## Turismo

La marborda situo de la komunumo ebligis disvolviĝon de turismo.

Temas ĉefe pri turismo rilata al la Natura Rezervejo de la golfeto de San-Briego.

La piedmigra vojo GR 34 iras laŭlonge de la marbordo preter la Golfeto-Domo kie vidiĝas prezentado pri flaŭro kaj faŭno maraj kaj marbordaj.

## Marokupoj

Tradicie, la loĝantoj de Hiliono ŝatas ŝipveturi por kapti fiŝojn, ankrante la ŝipojn en la haveneton San-Guimon. Ili ĝuas la strandon plukante marfruktojn, ĉefe konkulojn, kiam la maro retrofluas.

## La domo de la golfeto en Hiliono

La fundo de la golfeto de San-Briego evoluas laŭ la tajdoj. Kun miloj da malkovritaj hektaroj dum basa tajdo, kun moviĝantaj riveretoj, kiuj senĉese kruciĝas kaj disiĝas por fine atingi la maron, la golfeto de San-Briego proponas grandiozan spektaklon, kie fontas la vivo. Fakte, tiu golfetfundo ĉefe rolas en ekologia funkciado de la tuta golfeto.

Dank' al ties ekologia riĉeco, la du golfetoj de «Yffiniac» kaj «Morieux» vintre iĝas internacie famkonataj haltejoj por migrantaj birdoj. Ĉiuvintre, ĉirkaŭ 50 000 birdoj rendevuas. Multaj el ili ( bernikloj, marĉaj skolopoj, anasoj...) traflugas ĝis 10 000 kilometrojn antaŭ ol ripozi kaj sin nutri en tiu golfeto.

Jes ja, tiu golfetfundo estas ĉemara malsekejo internacie interesa. Ekde 1998, la franca ŝtato promociis ĝin kiel «nacia natura rezervejo».

Ĉi-tie, la domo de la golfeto (*foto dorsopaĝe*) celas protekti, administri kaj malkovrigi tiun minacitan naturan teritorion. Tiucele, ĝi organizas diversajn prelegojn, temajn piedirajn ekskursojn kaj staĝojn por la publiko.

Venontan aprilon, la organiza kongresa komitato (OKK) proponos al la kongresanoj viziti, malkovri kaj observi tiun mirindan golfeton.

Por scii pli:

<http://www.reservebaiedesaintbrieuc.com/>

## Gastigadebleco dum la kongreso: Amasloĝejo en San-Briego

En nobeldomo de la 15a jarcento amasloĝejo de la golfeto San-Briego akceptos parton de la kongresanoj.

Retaj informoj tra: <http://www.fuaj.org/Saint-Brieuc>

**Laurent, Alain, Amapola, Franjo kaj Guy.**

(\*) Tamen en la franca Wikipedia, estas skibite (trad) : La nomo de la komunumo devenas de la romia kampo tie instalita *Iliacus Roboris*, kie nun troviĝas la bieno de «Carbien», kiu respektas la ĝeneralan formon... (NDLR)

Fotoj:  
Franjo kaj Guy



La sagaro  
de Hiliono...



la Domo de la Golfeto

## En 2010, SAT Amikaro organizos sian jaran kongreson en Hiliono (Hillion)

...agrabla duoninsulo en la ĉirkaŭaĵo de San-Briego kaj ĉe ĝia golfeto, en la departemento « Côtes d'Armor ».

Nuntempe, Hiliono iĝas tro fama en Francio pro siaj verdaj algoj kaj ties danĝeroj. Dank' al apogo de la lokaj elektitoj, nia kongreso ebligas ŝanĝi tiun komunuman bildon en kaj ekster nia lando.

Espéranto 22 preparas tiun kongreson, dank' al sia OKK (organiza kongresa komitato).

Ĉiumonate, via preferata revuo, La Sago, informos vin pri la regiono, ties famkonataj verkistoj, lokaj agantoj, temoj proponataj por debati, ekskursoj, ...

Decembre, la legantoj ricevos la aliĝilojn kaj praktikajn informojn.

Ekde nun, ni invitas vin mendi vian bretonan flanon, sed ĉefe rezervi viajn tagojn de la 3-a ĝis la 6-a de aprilo 2010.

komuniko de la OKK

La kongresejo  
unu flanko...



La kongresejo  
alia flanko...



**Hiliono:** El gorĝo, kun bando el arĝento ŝarĝita de tri ermen-felmakuloj